# tejo:aktuale

n° 511 | Decembro 2025

**Karaj abonantoj, rebonvenon!**
Alproksimiĝas la fino de la jaro, tempo por retrorigardi, danki kaj festi kune. En Roterdamo la volontula vivo daŭris inter vintra etoso, lastaj taskoj de la jaro kaj la kreskanta ekscito pro la **Junulara E-Semajno (JES)** en Germanio, kiu denove kunvenigas junajn esperantistojn el la tuta mondo.
En tiu ĉi decembra numero de **TEJO-aktuale** vi trovos la plej freŝajn novaĵojn, alvokojn kaj informojn por glate fermi la jaron kaj bonvenigi la novan. Agrablan legadon, belan jarfinon kaj ĝis revido en JES! 🌍

## ALVOKOJ




### Iĝu estrarano de TEJO

Kandidato por iĝi estrarano de TEJO devas esti individua membro de TEJO en 2026 naskita inter la 1-a de septembro 1990 kaj la 31-a de aŭgusto 2008.

Por kandidatiĝi, sendu mesaĝon al elekta.komisiono@tejo.org **ĝis la 30-a de januaro 2026** kun via vivresumo, motiviĝletero kaj indiko pri la fakoj, kiujn vi pretus transpreni en la Estraro. ✍️ Jen la plena teksto de la alvoko.

## ANONCOJ

### Esperanto Senlime - fino de la unua sezono

Spektu la finajn epizodojn de la unua sezono de nia serio Esperanto Senlime en nia jutuba kanalo! Kiu teamo gajnos?

**Individuaj membroj kaj patronoj de TEJO ricevos enketon por doni la lastajn poentojn**. Aliĝu al TEJO por subteni vian preferatan teamon!

### Filmeto de TEJO por la Zamenhofa Tago de 2025




Ĉi-jare ni demandis al esperantistoj **“Kion signifas por vi paco?”**. 🕊

Ni ricevis diversajn respondojn de niaj samideanoj.

Spektu la videon en nia jutuba kanalo kaj skribu viajn komentojn!





### La Internacia Tago de la Volontuloj

La 5-an de decembro ni festis la Internacian Tagon de la Volontuloj!

Foje la laboro de volontuloj estas subtaksata, sed ili vere estas la **motoro de la movado**. Granda parto de ĉio kio okazas en Esperantujo estas efektivigata de homoj kiuj donacas sian tempon por ke la movado restu viva kaj aktiva.

---

## FORPASOJ




### Esperantujo funebras

Forpasis **Rob Moerbeek** (1936-2025), nederlanda samideano kiu dediĉis sian plenan vivon al Esperanto, kiel oficisto de UEA en CO kaj volontulo post sia emeritiĝo. Rob estis provleganto de plej diversaj Esperanto-publikaĵoj, inkluzive de nia revuo Kontakto.

Kondolencojn al liaj familio kaj amikoj kaj al la tuta Esperanto-komunumo. ✝

---

## EVENTOJ

**Trovu eventojn en Eventa Servo!**

# La Horoskopo



**Antaŭdirita de TEJO-Aŭguristino Sortirja**

Nova jaro, novaj promesoj, samaj retmesaĝlistoj. La steloj en januaro ankoraŭ estas iom konfuzitaj post la jarfina festado, sed ili klare montras unu aferon: la movado ne ripozas, eĉ se vi promesis al vi mem “malpli da projektoj ĉi-jare”. Januaro estas monato de reekigoj, bonintencaj planoj kaj dolĉa iluzio, ke ĉi-foje vi vere tenos vian kalendaron sub kontrolo. Malkaŝa antaŭvido: tio ne okazos. Sed tio estas en ordo.




♈ La jaro komenciĝas kun eksploda energio. La 3-an de januaro vi proponas novan projekton en la loka grupo. Ĉu iu petis tion? Ne. Ĉu vi faros ĝin ĉiuokaze? Kompreneble. Se vi ankoraŭ portas la energion de JES, tio klarigas multon. Konsilo de la steloj: antaŭ ol komenci, kontrolu ĉu vi ankoraŭ ne respondecas pri tri aliaj “etaj taskoj”.




♉ Januaro invitas vin malrapide reveni al la realo. Dum aliaj panikas pri rezolucioj, vi trankvile planas unu konkretan aferon por la jaro – kaj efektive realigos ĝin. En Esperantujo vi estos la stabila punkto, al kiu ĉiuj skribas kiam io urĝa aperas. Ne forgesu diri ankaŭ “ne”.




♊ Nova jaro, nova identeco! En januaro vi subite interesiĝas pri temo, pri kiu vi antaŭe tute ne parolis. Vi saltos inter babilejoj, forumoj kaj videovokoj, klarigante al ĉiuj, ke “ĉi tio estas via ĉefa fokuso nun”. Ĝis februaro, almenaŭ.




♋ La postfestaj emocioj ankoraŭ resonas. Januaro estas por vi monato de interna purigado: vi rerigardas pasintajn eventojn, mesaĝojn kaj eĉ malnovajn konfliktojn. Bona novaĵo: vi finfine pretas lasi ion iri. Malpli bona novaĵo: vi ankoraŭ skribos longan noton pri tio en via taglibro.

♌ Kvankam januaro grizas, vi trovos manieron brili. Eble per inspira novjara mesaĝo, eble per neatendita apero en reta evento. Homoj rimarkos vin, eĉ se vi nur “hazarde” enŝaltas la kameraon. Se vi




estas aktiva en TEJO, la steloj diras: ĝuu la atenton, sed ne monopoligu la mikrofonon.




♍ Nova jaro signifas: novajn tabelojn. Vi reorganizas ĉion – dosierojn, planojn, kaj eĉ viajn personajn celojn por la movado. Januaro estas perfekta por vi, ĉar ĉiuj aliaj ankoraŭ estas konfuzitaj, dum vi jam havas klaran liston. Nur memoru: homoj ne ĉiam funkcias laŭ via sistemo.




♎ Vi eniras la jaron kun deziro pri harmonio. Januaro donas al vi ŝancon mildigi malnovajn tensiojn en la komunumo – eĉ tiujn, kiuj ŝajnis nesolveblaj. Sincera konversacio (aŭ bone tempumita memeo) povas fari miraklojn.




♏ La steloj flustras: “Ne ĉio devas esti batalo”. Sed ĉu vi aŭskultos? Januaro alportas intensajn diskutojn kaj profundajn decidojn. Vi povos transformi konflikton en fortan projekton – se vi elektos strategion anstataŭ dramo. Malfacile, sed eble ĉi-jare vi sukcesos.




♐ La nova jaro vekas vian vojaĝemon. Vi jam rigardas eventojn en landoj, kie vi neniam estis, kalkulante feriotagojn, kiujn vi ankoraŭ ne havas. Januaro estas ideala por revi grandskale. Praktika planado? Tio estas por februaro.




♑ Dum aliaj ankoraŭ resaniĝas post festoj, vi jam laboras. Januaro estas via natura medio: planado, strategio, respondeco. Vi estos la voĉo de racio enmovade, ofte ankaŭ en TEJO. La steloj diras: ne forgesu festi ankaŭ viajn proprajn sukcesojn, eĉ se ili ne estas en Google Sheets.




♒ Januaro donas al vi fulmon de inspiro. Vi subite vidas la “veran estontecon” de Esperanto kaj vi volas tuj klarigi ĝin al ĉiuj. Iuj ne komprenos, aliaj rulos la okulojn – sed unu persono estos vere inspirita. Por vi, tio jam valoras.




♓ La nova jaro igas vin pensema kaj sentema. Januaro alportas belajn, trankvilajn momentojn: profundajn konversaciojn, poeziajn tekstojn, aŭ silentajn partoprenojn en retaj eventoj. Vi memorigas al la komunumo, ke Esperanto estas ne nur projektoj kaj planoj, sed ankaŭ sentoj. Kaj tio estas via donaco.




Kiel membro de TEJO, vi subtenos nian junularan movadon, ricevos la revuon *Kontakto* kaj rabaton al IJK kaj aliaj eventoj. Vi havos la eblon partopreni en trejnadoj kaj projektoj kaj kundecidos pri nia agado. Vi povos ankaŭ aktive kontribui al TEJO partoprenante en la Komitato aŭ niaj komisionoj.

Ĉu vi volas kontribui sendante interesajn novaĵojn por la venonta numero de TEJO-aktuale? Sendu viajn novaĵojn al info@tejo.org antaŭ la 23-a tago de la monato. Antaŭdankon pro la helpo!

## Kolofono

***TEJO-aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas unufoje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** TEJO-volontuloj
**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) · tejo.org

*Kopirajto © 2025 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn? Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni la retpoŝtan bultenon.

This email was sent to <<Retpoŝtadreso>>
*why did I get this?* unsubscribe from this list update subscription preferences
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo · Nieuwe Binnenweg 176 · Rotterdam, Zh 3015BJ · Netherlands